

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2020:1



Fastobulko (foto: Wikipedia commons, (CC BY-SA 3.0))

Ni festu, venos la fasto!

Fasto kaj preĝo riĉecon ne donas.
Ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto.
Post la fasto [tamen] venos festo.

Zamenhofaj proverboj

La longa fasta periodo antaŭ pasko estas de katolika deveno. Ĝi komenciĝas per la “Vianda Dimanĉo”, poste sekvas la “Blua Lundo” kaj la pli konata “Grasa Mardo”. Dum tiuj tri tagoj (butersemaĵoj² [fastlagen]) oni devas multon stoki ĉar poste, komenciĝante per la “Cindra Merkredo”, oni dum 40 tagoj fastas. La fastobulko (*semlan*, *fastlagsbulle* aŭ *fettisdagabulle*) farita el blanka faruno, batita kremo kaj marcipano estas tamen moderna sukeraĵo el la komenco de la 20a jarcento.

Legu pli (svede): www.nordiskamuseet.se/aretsdagar/fettisdagen

Natura Esperanto-Festivalo kun esperantokursoj

Ĉefaj instruistoj estos Tim Morley kaj Paulina Kožuchová

Vidu paĝon 7



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2020 • 108-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen:

laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Bengt Olof Åradsson

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund. Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070-6200846

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Plusgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården,

680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: +4670 767 54 55

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Kungsgatan 13B, lgh 1201; 281 48 Hässleholm;

Tel 070-200 4574

E-post: laespero@esperantoforbundet.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Nytt år, nya tag! Styrelsen samlades i Herrljunga helgen 8-9 februari för att diskutera idéer, gå igenom arbetsformerna och göra upp planer för vår verksamhet. Idéer saknas inte, däremot i viss mån tid och ork. Vi vill ännu en gång påminna om möjligheten att ingå i någon av arbetsgrupperna för de fokusområden vi delar in verksamheten i: *förvaltning* (det mer traditionella, administrativa styrelsearbetet), *information* (göra broschyrer, informationsmaterial för olika medier, förbereda och bemanna mässor och informationsbord på evenemang där vi deltar), *mötesplatser* (organisera träffar och kongresser), stöd till medlemmar (olika former av fortbildning och utbyte av erfarenheter), och *arkiv* (gå igenom, sortera och gallra bland material att arkivera för eftervärlden).

De, som i enkäten vid förra årsmötet kom med förslaget om träffar mer inriktade på socialt umgänge, har chansen till detta genom att delta i Esperanto-Gårdens vårträff under vecka 21 (16-24 maj), då vi också kommer att hålla SEF:s årsmöte under lördagen den 23 maj. Ett annat sätt är att samla några esperantister, som bor hyggligt nära varandra, till en kaféträff. Det går ju att, som våra medlemmar i Norrbotten, starta t.ex. en Facebook-grupp där man kan komma överens om tid och plats för träffen. På *esperantoforbundet.se* finns även *Kalendaro* där man kan fylla i ett formulär för att tipsa om planerade aktiviteter, så att fler får reda på dem. Skriv gärna och berätta om aktiviteter såväl på som utanför klubbträffar till LA ESPERO. Det kan ge inspiration till andra grupper att göra något liknande!

Vi har avslutat vårt konto i JAK-banken, eftersom de inte längre erbjuder autogiroinbetalningar till kontot. Förra året uppmanade vi våra Rondo Langlet-medlemmar med autogiro att i stället lägga in i sin bank en återkommande betalning till vårt konto 2012-3. Några har gjort detta och det fungerar bra. Andra föredrar att skicka in ett engångsbelopp. Det går också bra.

Medlemsavgifterna har börjat rulla in, även för Stockholmsklubben som har valt att ha central uppbörd. En annan klubb har redan redovisat sina medlemsavgifter. Betala gärna in era medlemsavgifter så snart som möjligt, så att ni inte riskerar att bli utan tidningen eller att inte ha rösträtt på vårt årsmöte. Tänk också på att anmäla adressändring vid flytt så att tidningen inte kommer bort!

Styrelsen

Kallelse

till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Årsmötet kommer att hållas den 23 maj 2020 kl 14.00 på Esperanto-Gården i Lesjöfors.

Motioner till årsmötet ska vara styrelsen tillhanda senast 23/3 på adressen svenska@esperantoforbundet.se eller per post till SEF, Box 2276, 103 17 Stockholm.

Dagordning för årsmötet samt verksamhetsberättelse för 2019 kommer att finnas tillgängliga en månad före årsmötet, dvs den 23/4. Titta på vår hemsida esperantoforbundet.se eller kontakta styrelsen.

För att ge rösträtt på årsmötet ska medlemsavgiften vara betald senast den 23/4. Klubbarnas ombudsfullmakter ska vara styrelsen tillhanda senast samma datum, den 23/4. Se utdrag ur stadgarna bredvid.

Den som inte har möjlighet att resa till Lesjöfors för att delta i årsmötet kommer att erbjudas möjlighet att delta via Internet. Kontakta styrelsen på svenska@esperantoforbundet.se för att få en länk till mötet.

Styrelsen för Svenska Esperantoförbundet

Utdrag ur stadgarna

9.4 Rösträtt för varje medlem:
Varje medlem som erlagt aktuell medlemsavgift senast en (1) månad före årsmötet och som fyllt sexton (16) år före mötet har en (1) röst vid årsmötet. Ansluten esperantoförening skall redovisa medlemsavgifter till förbundet senast två (2) veckor före årsmötet.

9.5 Rösträtt för ombud för ansluten förening, förutom rösträtten enligt § 9.4:
Varje till förbundet ansluten esperantoförening med minst fem (5) medlemmar äger rätt till årsmötet sända ett ombud för varje påbörjat femtio-(50)-tal medlemmar. Medlemsantalet räknas på antalet redovisade medlemsavgifter den 31 december föregående år. En medlem får inte räknas i mer än en förening. Föreningens ombudsfullmakt skall lämnas till förbundets styrelse senast en (1) månad före årsmötet. Ombudet ska själv vara röstberättigat, och får inte företräda mer än en röst utöver sin egen.

Kallelse till medlemsmöte

Medlemmarna i Esperantogården i Lesjöfors ekonomisk förening kallas till medlemsmöte på plats på kursgården onsdagen den 20 maj kl. 17. Val av styrelsemedlemmar och revisorer samt godkännande av stadgändringar.

Styrelsen

Kallelse till årsstämma

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a. kallar till årsstämma 23 maj 2020, kl 11.00 på Esperanto-Gården i Lesjöfors.

Styrelsen

Vortaro eniras novan jaron

Grupo de preskaŭ dek personoj dividas inter si la laboron enskribi la manuskripton pri vortaro de Roland Lindblom (1931–2016) en komputilan programon. La grupon gvidas Leif Nordenstorm, prezidanto de la Eldona Societo Esperanto. En januaro li konstatis, ke nun oni laboras je ĉiuj el la literoj de la alfabeto de esperanto. Kelkaj el la literoj estas "pretaj", do enskribitaj kaj ankaŭ kontrolitaj.

La enskribitaj partoj estas videblaj per interreto, kaj tie estas

la informo ke literoj L, M kaj S-Z estas bone serĉeblaj. Ankaŭ aliaj literoj estas serĉeblaj, sed ne kompletaj.

La laboro pri la enskribo komenciĝis antaŭ tri jaroj. En decembro 2019, Leif Nordenstorm skribis en la interreta "diskutejo", ke estas tri-jara jubileo de la laboro. La aktuala diskutado

temas pri principoj de nomoj de ŝtatoj, ĉar okazas ke ili ŝanĝas nomon. Diskutoj ankaŭ temas pri kontroloj de nomoj de bestoj kaj plantoj.

Por provi serĉi vorton, uzu la suban interretan adreson.

Ulla Luin

ordboken.esperanto.se/test/soktest.html

print

semestro: **printempa** semestro vartermin

latiro: **printempa latiro** (bot) (*Lathyrus vernus*) vart

skrofulario: **printempa skrofulario** (*Scrophularia vernalis*) vartflora

veroniko: **printempa veroniko** (bot) (*Veronica verna*) vartveronika

Om vårträffen på Esperanto-Gården:

"I början av 1980-talet fanns det mellan 2500 och 3000 esperantister i de olika svenska organisationerna. En del aktiva med specialintressen fanns, vilket innebär en viss risk för statistikfel. De äldre aktiva sa ofta: 'Tänk om esperantorörelserna har haft en egen kursgård eller en folkhögskola. Det skulle höja språkets status.'

Jag konstaterade snabbt att de olika organisationerna försökte 'sno' mig till sin organisation – trots Zamenhofs ord 'Detta språk skall vara neutralt när det gäller kön, hudfärg, politik, religion och språklig tillhörighet.' Kan det vara 'klubbtänkandet' som förhindrar utvecklingen av esperanto? Att samarbeta kan vara svårt i en liten organisation med få medlemmar, och samarbetet blir svårare och svårare ju fler medlemmarna blir och deras spridning.

Därför är det viktigt att det finns ett gemensamt överenskommet mål som alla jobbar för att uppnå. Alltifrån den enskilde medlemmen till små och större grupper."

Lennart Svensson

Preliminär programstruktur

Delarrangemang 1: 15–18 maj	Delarrangemang 2: 19–21 maj	Svenska Esperantokongressen 22–24 maj
Praktisk arbete och informella diskussioner om framtidsfrågor	Förkongress. Preliminärt program:	Preliminärt program:
<ul style="list-style-type: none"> Medlemstalen sjunker – varför? Kan vi genom nordiskt samarbete få vind i seglen men hur? Marknadsföring är dyrt och ger osäkra resultat. Gemensamt mål eller inriktning för svenska esperantoorganisationer 	19/5 tisdag Ankomstdag: kl. 12.00 sopplunch 20/5 onsdag kl. 8.00 – ca. 16.00 Utflyktsdag kl. 17.00 E-G:s extrastämma för att stadfästa de stadgeändringar som ordinarie stämman beslutade om. 21/5 torsdag Föredrag och utrymme för andra Esperantoorganisationers årsmöten eller andra aktiviteter.	22/5 fredag Ankomstdag: kl. 12.00 sopplunch kl. 15.00 Välkomsttal och information, E-G bjuder på kaffe 23/5 lördag kl. 11.00 Förslagsföreningens årsmöte kl. 14.00 SEF:s årsmöte 24/5 söndag kl. 12.00 Avslutning med lunch. <i>Ytterligare detaljer kommer publiceras på SEF:s hemsida, www.esperantoforbundet.se</i>

Måltidspriser (per dag)

Kostnad för övernattnings m.m. tillkommer, kontakta Esperanto-Gården för priser: egarden@esperanto.se
 prez: anna.ritamaki@kolumbus.fi
 vicprez: sel.lesjofors.se@gmail.com

Frukost	60 kr
Förmiddagskaffe	20 kr
Lunch	70 kr
Eftermiddagskaffe	20 kr
Middag	90 kr

Möjligheten finns att delta i ett eller flera delarrangemang. Respektive organisation bestämmer själv om deras möten och andra programpunkter endast är öppna för de egna medlemmarna. Esperantogårdens extrastämma är öppen för alla; alla har även yttrande- och förslagsrätt, men endast andelsägarna har besluts- och rösträtt.

Transport

Åk buss eller tåg till Karlstad eller Kristinehamn. Därifrån vidare till Lesjöfors med Värmlandstrafiken med följande avgångstider på vardagar:

	Från Karlstad busstation	Från Kristinehamn
	12.50	12.10
	13.50	13.05
	14.50	15.10
	15.50	16.10
	16.60	17.10



Anmälan

Anmäl ditt deltagande senast 17 april, helst via webbformuläret på Esperantoförbundets hemsida www.esperantoforbundet.se, alternativt per e-post svespkon2020@esperantoforbundet.se; du får då ett svarsmejl med uppgifter att fylla i. I sista hand per telefon till Esperanto-Gården.

Kvizo, novaĵoj, festo kaj vojaĝo

Pri agado de la klubo de Stockholm

Dum la monatoj novembro ĝis januaro, la klubo de Stockholm aranĝis kvar kunvenojn. Unu temis pri facila kvizo "20 demandoj", kiun oni poste iom ripetis je okazo kiam gvidanto de kunveno alvenis malfrue. Alia vespero temis pri novaĵoj el la aktualaj svedaj gazetoj, pri arboj, tertremo, manifestacio, Eŭropa Unio, kaj estis diskuto pri tiuj temoj.

Lumfesto en decembro enhavis bulkojn kun safrano kaj kantadon helpe de la violono de Agneta Järnlström. En januaro Ingvar Enghardt rakontis pri vojaĝo por renkonti germanajn parencojn sed ankaŭ por atentigi pri la memortagoj de la militaj koncentrejoj kaj kontraste por rakonti pri la iniciatoj de la esperanto-urbo Herzberg.

Ulla Luin

Radia intervjuo kun Anna Ritamäki-Sjöstrand

Svedlingva intervjuo kun mi dediĉas la unuajn dudekon da minutoj al la temo esperanto kaj ankoraŭ pli al diverseco kaj egaleco.

Nu är den ute på den åländska podcasten "Samtal" – Samtal.ax:

"Anna Ritamäki-Sjöstrand är folkrättsexpert och har jobbat med samhällsfrågor större delen av sitt liv. Senast som lagberedare. Numera har hon sadlat om och jobbar med alternativ friskvård. 2010 dog hennes dotter Ragnhild i plötslig spädbarnsdöd."

Och fram till ca 20 minuter handlar det om det internationella språket esperanto varpå följer frågeställningar kring finlandssvenskarna och svenskan i Finland innan vi kommer in på ämnena ovan.

Lyssna här:

<https://www.podbean.com/ew/pb-6mt7m-d2ef97>
Anna Ritamäki-Sjöstrand

Kan Herrljunga bli en nationell stad för esperantotalare att sammanstråla i?

Det svenska esperantoarkivet är lokaliserat till Herrljunga. Då har jag en öppen fråga:

Går det att bygga vidare på Herrljunga som platsen där man talar esperanto – precis som med Herzberg am Harz i Tyskland? På sikt kanske man kan få vissa skyltar tvåspråkiga (svenska och esperanto) samt bygga vidare på samarbeten med lokala aktörer att uppmärksamma esperanto i olika sammanhang.

Rickard Vesterberg

La esperantista grupo en Norrköping

Dum 2019 la malgranda esperantista grupo en Norrköping havis ses kunvenojn, kvar en la printempa sezono kaj du en la aŭtuna. La plej interesa estis en marto kiam Sten Johansson rakontis pri sia verkista laboro. Konversacian studrondon kun ses partoprenantoj ni aranĝis dum la printempa semestro kune kun la studorganizo NBV. Nia informilo Kelklinie pri... aperis trifoje. Ni ankaŭ partoprenis en la eventon Kulturrundan en la urbokvartalo Röda stan.

Unuopuloj ankaŭ agis. Sten Johansson eldonis ankoraŭ unu libron "Ne eblas aplaudi unumane". Martin Häggström laboris en la skipo kiu faras novan "Esperanto-Svensk Ordbok". Agneta Emanuelsson estis elektita kiel senatano en la parlamento de Civito. Ŝi kaj Roland Eriksson ankaŭ diversmaniere informis pri Esperanto, interalie per amatora radio.

Martin Häggström

Sten Johansson rakontas pri sia multjara verkista laboro



Polens radio 29 nov 2019

I andra hälften av programmet från Polens Radio finns en mycket bra intervju med Sten Svenonius:

Sök på nätet:

E_elsendo el la 29.11.2019

Inslaget med Sten börjar efter 16.41 min – hela programmet är drygt 30 minuter.

Inga J

(Information från <http://www.esperanto-gbg.org/>)



Hej alla "legemuloj"

Här kommer tips om var ni kan hitta texter av olika slag. Gå in på verkoj.com, där finns länkar till ett stort antal böcker och andra texter av olika slag, t. ex. utbildning, erotik, klassiker, humor, essäer, barnböcker, sånger, poesi, fabler, romaner, vetenskap ... T.o.m. korsord finns där, på esperanto så klart.

Jag hittade också under *Antaŭaj artikoloj* en liten snutt om Martin Strid och hans färöiska ballader: *Ĉendanci baladojn Esperante?* Klickar man på länken där så kan man läsa lite mer och också titta på en film.
Bonan legadon!

Ann-Louise Åkerlund

Aliaj interretaj trezorejoj

Krom la retpaĝo, kiun Ann-Louise mencias supre, troviĝas multaj aliaj utilaj kaj interesaj retpaĝaroj, kiujn, tiuj kiuj uzas komputilon, povas viziti. Kelkaj ekzemploj:

- liberafolio.org, kie vi povas inter alie legi ke:
 - la unua eldono de PIV aperis en 1970. La lasta tradicie presita eldono aperos en 2020. Bertilo Wennergren redaktos ĝin.
 - en la Esperanta versio de *Vikinovaĵoj* nun eblas legi freŝajn mondajn novaĵojn ĉiutage.
- multedaridoj.blogspot.com/, kie vi trovas amuzajn striojn, vidu ekz sube.
- apetito.ikso.net/, Bonan Apetiton estas retejo por vegetaraj kaj veganaj receptoj en Esperanto.
- [gutenberg.org/wiki/Esperanto \(Bookshelf\)](http://gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf)), kie vi trovas malnovajn tekstojn (ĝis 1922) kiuj estas verkitaj en Esperanto aŭ kiuj temas pri Esperanto.
- fontoj.net, kie vi trovas kristanajn tekstojn kaj materialojn.



Peto de Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Ni petas vin anonci al viaj membroj pri nia servo jene: Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al:

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

Ni atendas vian afablecon plenumi nian peton.

Kun anticipa danko ni kore salutas vin.

Nobuo Sakurai

Respondeculo de koresponda servo de JEI

Sommardagar i Göteborg

— prova en intensivkurs i Esperanto —



Plats: Karl Gustavsgatan 15, hpl Vasa-Viktoriagatan.

Tid: må 22 – fr. 26 juni 2020 kl. 10–15.

Avgift: 100:–/dag = 500:–

Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening, ILEI och Studieförbundet Vuxenskolan.

Grupper på tre olika nivåer.

Förhoppningsvis får vi utländska medhjälpare.

Under våren kommer mer information på Göteborgs Esperantoförenings hemsida:

www.esperanto-gbg.org

Frågor? Kontakta Siv Burell 070–721 34 79, siv.burell@gmail.com.

Natura Esperanto-Festivalo kun esperantokursoj

Esperanto-Gårdens traditionella sommarkurser
14–21 juni (söndag är ankomstdag och avfärdsdag)

Kurser på alla nivåer samt kultur- och naturprogram!



Meddela dina kontaktuppgifter till Esperanto-Gården för närmare upplysningar. Vi övergår till mobilnummer i stället för fast telefon: +46 70-767 54 55. Tyvärr är vår hemsida www.esperantogarden.se nere när detta skrivs. Vi hoppas lösa det tekniska snarast men ber er för säkerhets skull skriva till vår nygamla adress egarden@esperanto.se. Följ oss även på Facebook.

Ĉefaj instruistoj estos Tim Morley kaj Paulina Kožuchová

Tim Morley eklernis esperanton en 2001, kaj ekinstruis ĝin en 2002! Li estas ĉiujara instruisto ĉe la Somera Esperanto-Studado. En 2012 li faris TEDx-prelegon pri sia instruado de esperanto en bazlernejoj en lia hejma urbo de Kembriĝo en Britio. Krom instrui lingvojn, li estas patro, aktiva en la movado *Extinction Rebellion* kaj pasia pri ekologia vivado.



Paulína Kožuchová (sube) devenas de Slovakujo, sed dum pluraj jaroj loĝis en aliaj mondo-partoj, interalie en Svedujo. Ŝi esperantistiĝis en 2004, aktivis en Slovaka Esperanto-Junularo kaj TEJO, kaj kunfondis la blogon egalecen.org. En sia neesperantista vivo, Paulina estas instruisto en mezlernejo. Ŝi aktivas pri socia kaj media justecoj, kaj pri homaj kaj bestaj rajtoj.



Malklaras pri nia retejo (estis miskompreno kun la servilspaca provizanto, sed nun finfine estas indiko ke tre baldaŭ refunkcios esperantogarden.se), do ni krome indikas la malnovan retadreson egarden@esperanto.se kaj la rektajn retadresojn de prez: anna.ritamaki@kolumbus.fi vicprez: sel.lesjofors.se@gmail.com

Serĉu lin en www.youtube.com per la vortoj *Tim Morley TED*

Tre estimataj gekunvenintoj, geamikoj, mi estas unu el tiuj, kiuj ankoraŭ vivas kaj unu el la malmultaj, kiuj ĝis preskaŭ la lasta momento antaŭ la liberigo estis en ĉi tiu loko. Je la 18a januaro komenciĝis mia tiel nomata evakuado el la koncentrejo Aŭŝvico, kiu post ses kaj duona tagoj montriĝis por pli ol la duono de miaj kunkaptitoj kiel mortomarŝo. Ni estis kolono de 600 personoj. ...

Kiam ekestis la milito, mi estis adoleskanto. Mia patro estis soldato kaj estis suferinta gravan pafvundon de la pulmo. Tio estis dramo por nia familio. Mia patrino devenis el la pola-litova-belorusa limregiono. Tie estis trapasintaj la armeoj, tien kaj reen, ili marodis, prirabis, perfortis, forbruligis vilaĝojn, por ke ne restu io por tiuj, kiuj venis post ili. Pro tio oni povas diri, ke mi aŭtentike sciis, kion signifas milito. Tamen ŝajnis al mi, kvankam estis pasintaj nur 20, 25 jaroj, ke ĝi estis tiom fora kiel la polaj insurekcioj en la 19-a jarcento aŭ la franca revolucio.

Kiam mi hodiaŭ renkontas gejunulojn, mi konsciiĝas, ke ili post 75 jaroj estas iom teditaj de ĉi temo: kaj de la milito kaj de la holokaŭsto, de la ŝoaho, de la genocido. Mi komprenas ilin. Pro tio mi promesas al vi, junaj homoj, ke mi ne parolos pri mia mizero. Mi ne rakontos al vi pri miaj travivaĵoj, pri miaj du mortomarŝoj, pri tio, kiel mi travivis la finon de la milito, kiam mi pezis 32 kilogramojn, rande de la plenekserpiĝo kaj de la vivo. Mi ne rakontos pri tio, kio estis la plej malbona, tio estas pri la tragedio esti apartigata de miaj plejproksimuloj, kiam vi post la selektado antaŭsentas, kio ilin atendas. Ne, pri tio mi ne parolos. Mi volas paroli kun la generacio de mia filino kaj la generacio de miaj genepoj, pri ili mem. ...

Ni dum momento reiriu en niaj pensoj, nia imagopovo, en la fruajn 1930ajn jarojn al Berlino. ... Kaj iun tagon en la fruaj 1930-jaroj aperas sur la benkoj ŝildo: “Por judoj la sidado sur ĉi benkoj estas malpermesata”. Oni povus diri: Tio estas malkonvena, neĵusta, ne oŭkej, sed finfine ja estas proksime tiom da benkoj, oni ja povas sidigi sin aliloke, ne estas malfeliĉo.

Estis kvartalo, en kiu loĝis reprezentantoj de la germana intelekta elito juddevena, ankaŭ Albert Einstein, la nobelpremiito Nelly Sachs kaj la industriulo, politikisto kaj ministro pri eksteraj rilatoj, Walter Rathenau. Poste aperis en la naĝejo la ŝildo: “Por judoj la eniro al la naĝejo estas malpermesata”. Oni denove povus diri: tio ne estas agrabla, sed Berlino havas tiom da lokoj, je kiuj oni povas sin bani, tiom da lagoj, kanaloj, preskaŭ kiel en Venecio, oni do povas iri al alia loko.

Samtempe aperas ie la ŝildo “Por judoj la membreco en germanaj kantkluboj estas malpermesata”. Nu, kio do? Se ili volas kanti aŭ muziki, ili do renkontiĝu apartigite kaj ili certe povos kanti. Tuj poste aperas surskribo kaj ordono: “Por judaj nearjaj infanoj la ludado kun germanaj, arjaj infanoj estas malpermesata”. Ili ludos solaj. Kaj post tio aperas ŝildo: “Al judoj oni vendas panon nur post la dek sepa horo”. Tio ja estas malhelpaĵo, ĉar tiam la elekto estas malpli granda, sed finfine oni ja povas iri por aĉeti ankaŭ post la kvina posttagmeze.

Atenton, atenton, ni komenciĝas al kutimiĝi je la penso, ke oni povas ekskludi iun, stigmatizi iun, fremdigi iun. Kaj tiel la

homoj lante, pli kaj pli, tagon post tago, intimiĝas pri tio – kaj la viktimoj kaj la faruloj kaj atestuloj, kaj tiuj, kiujn ni nomas apudstarantoj al kutimiĝas je la penso kaj ideo, ke ĉi minoritato, el kiu devenis Einstein, Nelly Sachs, Heinrich Heine kaj la Mendelsohnoj estas io alia, ke ĝi povas esti elpelata el la socio, ke ĝi konsistas el fremdaj homoj, ke tiuj estas homoj, kiuj devastiĝas mikrobojn, epidemiojn. Tio vere estas terura, danĝera. Tio estas la komenciĝo de tio, kio povas tuj sekvi.

La tiamaj potenculoj unuflanke faris ruzan politikon, ĉar ili ekz. plenumis la postulojn de la laboristoj. La 1a de majo neniam antaŭe estis festita en Germanio, sed ili ja faras tion, jes. Je la senlabora tago ili enkondukas “Forto per ĝojo”. Elemento de laborista feriado, do. Ili kapablas superi la senlaborecon, ili povas ludi per la nacia digno: “Germanoj, stariĝu el la malgloro de Versailles. Regajnu vian fieron”. Kaj samtempe la potenculoj ekkonas, ke la homoj pli kaj pli estas kaptataj de sensentemo, de indiferenteco. Ili ĉesas reagi al la malbono. Kaj jen la potenculoj povas permesi al si pluakceli la proceson de la malbono.

Poste la alio rapidege sekvas: la malpermeso dungi judojn, la malpermeso vojaĝi eksterlanden. Kaj post tio rapide sekvas la deportado en getojn. Al Riga, Kaŭno, en mian geton, la geton de Lodz Litzmanstadt. De kie la plej multaj estas transportataj al Kulmhof am Ner, kie ili estas mortigitaj en kamionoj per eljetgasoj, kaj la resto venas al Aŭŝvico, kie ili estas murditaj en modernaj gaskameroj per ciklono B. Kaj jen pruviĝas vera, kion diris la aŭstra federacia prezidento: “Aŭŝvico ne falis el la ĉielo”. Aŭŝvico trotetis, faris etajn paŝojn, alproksimiĝis ĝis kiam okazis, kio okazis, ĉi tie. ...

Ni en Eŭropo plejparte devenas de la juda-krista tradicio. Kaj kredemaj kaj nekredemaj homoj rigardas la dek ordonojn sia civiliza kanono. Mia amiko, la prezidento de la Internacia Aŭŝvico Komitato, Roman Kent, elpensis dekunuan ordonon, kiu prezentas la spertadon de la ŝoaho, de la holokaŭsto, de la horora epoko de malestimo.

Ĝi tekstas: *Vi ne estu indiferentaj!*

Kaj tion mi volonte dirus al mia filino, tion mi volas diri al miaj genepoj. Al la samaĝuloj de mia filino, de miaj genepoj, kie ajn ili vivas: en Polio, en Israelo, en Ameriko, Orienteŭropo, Okcidenteŭropo. Tio ege gravas. *Ne estu indiferentaj*, kiam vi vidas historiajn mensogojn! *Ne estu indiferentaj*, se vi vidas, ke la pasinteco estas mistraktata por aktualaj politikaj celoj! *Ne estu indiferentaj*, se iu minoritato estas diskriminaciata! La esenco de la demokratio konsistas en tio, ke la majoritato regas kaj la minoritatoj devas esti protektataj. *Ne estu indiferentaj*, se iu registaro rompas jam ekzistantajn, kutimajn sociajn kontraktojn! Estu lojala al la ordono. Al la dekunua ordono:

Ne estu indiferentaj! Ĉar se vi estos indiferentaj, de unu momento al alia, iu Aŭŝvico subite falos el la ĉielo, sur vin kaj sur viajn posteulojn.

Laŭ dokumento de la Internacia Auschwitz Komitee,

Stauffenbergstrasse 13/14, 10785 Berlin; www.auschwitz.info

La artikolo estas iom mallongigita el la origina artikolo kiu estas publikigita en Dia Regno 1/2020.